

Fajrero n-ro 3

ESPERANTO-FAKO DE ZK ROH "TŘINECKÉ ŽELEZÁRNY"

Inĝ. J. Werner:

RAKETAJ MOTOROJ EN ASTRONAŬTIKO

Prolemaro de kosmaj flugoj estas vasta, ĝi nepre ne rilatas nur al konstruo de kosmaj ŝipoj kaj raketaj motoroj, kvankam estas necese konfesi, ke estas ĝuste raketmotoroj, kiuj ebligas transiron en astronaŭtiko de la stato pure teoria al eksperimentado, kiam estas eble en kosmon lanĉi aparatojn kaj hodiaŭ jam ankaŭ homon.

Inĝ. Milan Ledvina, la membro de astronaŭtika komisiono ĉe la Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj, en sia verko "Raketaj motoroj" (eld. SNTL) mencias, ke hodiaŭ la raketa fako ampleksas proksimume nur 15% de problemoj el la tuta fako, el la restanta parto apartenas 80% je problemoj de survojigo kaj gvido de raketoj, krom tio, astronaŭtiko, kiel speciala branĉo, tuŝas preskaŭ ĉiujn fakojn de scienco kaj tekniko, ekzemple biologion, psiĥofiziologion, kosmologion, geofizikon, esploron de materialoj, radioteĥnikon, k.a. Ĝuste tiu ĉi varieco de problemoj ebligas al la malgrandaj ŝtatoj, ke ili aktive partoprenu laboron je ties solvado.

Por ilustrati la nuntempan staton de raketaj motoroj oni indikas: por lanĉi tersateliton pezan 1 t estas bezona porta raketo, kies starta pezo estas ĉirkaŭ 100 t. La motor-tiro kutime estas 1,5 obla rilate al startpezo, t.e. en nia kazo 150 t.

La sovetaj sputnikoj atingas pezon preskaŭ 6,5 t, kio pruvas superecon de Sovetio en la sfero de la raketa tekniko. Por kosmaj ŝipoj destinataj por flugoj al planedoj kun kelkmembra personaro oni konstruas motorojn, kies tirpovo estas kelkmil tunoj. Kiel maksimumon oni konsideras 10 – 15.000 t.

En la lastaj tri jaroj forpasis supereco de fluecaj akcelaj materioj, minimume egalvaloraj estas solidaj akcelaj materioj, ĉar ili ebligas pli simplan konstruon de motoroj kaj hodiaŭ atingas fidindon ĝis 99,995% (la fluecaj maksimume 95%).

Krom tiu ĉi t.n. ĥemia metodo de raketa akcelo, kiu estas uzata hodiaŭ, oni laboras pri akcelmetodoj fizikaj, uzataj ekz. la energion atoman, elektran k.s. Por longedaŭra akcelado de supraj ŝtupoj de raketo aŭ por direktado de raketo ŝajnas esti taŭga motoro jona (iontový), en kiu jonoj (elektre ŝarĝitaj partoj de atomo) estas akcelataj per elektrostatika kampo je rapido 10 - 15-oble pli granda ol estas tiu de brulproduktoj el ĥemiaj akceloj materioj. Tirpovo de tiuj ĉi motoroj atingas nur kelkajn dkg aŭ kg.

Sendube grandan estonton havas atomaj (nukleaj) motoroj. Grava pozitiva kaŭzo de ties apliko estas, ke por sia funkciado ili ne bezonas materion, kies provizo sur Tero rapide elĉerpiĝas kaj ne lastvice tio, ke 1 kg de atom-brulaĵo donas milionoble pli da energio ol 1 kg de la plej bona brul-materialo en nunaj motoroj

(maks. 10.000 varm-kalorioj). Por tio gravege grandiĝos aga radiuso de raketoj. Kun atoma motoro ili facile flugos al Luno kaj reen, kaj ankaŭ atingos de Marso kaj Venuso ne estos problemo. Nun ankoraŭ ne estas plene solvita ŝirmado de radioaktivaj radioj. Versimile, almenaŭ komence la atommotoraj raketoj, pro sekurecaj kaŭzoj havas la unuan ŝtupon kun tradicia ĥemia brul-materialo.

Apud la jona kaj atoma motoroj estas longa vico de aliaj raketaj motor-sistemoj. Mi fine mencias ankoraŭ plasman motoron, ĉe kiu la plasmato (t.n. kvara substanco de materio) estas akcelata per elektromagneta kampo. En stadio de teoria studado estas metodoj uzataj ankoraŭ aliajn fontojn de energio, ekz. la sunradiadon.

La monda astronautiko estas paca flanko de scienca-teknika laboro en la esploro kaj eksperimentado en ĉiuj koncernaj fakoj, ankaŭ la atoma. Ĝi estas paca flanko tial, ke la celo estas ekkono, pli ampleksa vivo, estonto de nia pura realigo. Estas necese ĝin distingi de la flanko negativa - de intencoj militaj, kiuj estas en proksima rilato. Ni klopodu, ke militarismo ne direktu sciencon.

Laŭ la ĝisnunaj sukcesoj de Sovetunio ni povas facile taksu, ke la socialisma sistemo politika emfazas ĝuste la pacan direkton de la tekniko kaj de la sciencoj. La atomelektrejoj servas al homaro, atom-ŝipoj sulkas marnivelejn, la homaro atendas priokupon de la kosmo. Oni konstruas atom-aviadilojn kaj raketojn, al homoj malfermiĝas vojo al steloj. Estas sendube, ke tiu vojo havos denove sian komencon en la lando de J. A. Gagarin.

- o O o -

Inĝ. Vlastimil Kočvara:

EN SOMERA TEMPO

Nia putrujo - lando plena de laboro kaj entuziasmo, plena, de rememoraĵoj kaj naturbelaĵoj! Jarcentojn kaj jarmilojn kulturis ĝin niaj prapatroj kaj patroj kaj el iliaj kaloj ĉirkaŭis nian landon koljuvelo de homa kreo-povo.

Nur mallonge ni vizitu nian regionon kaj ni dediĉu al ĝi kelkajn tagojn de nia libertempo. Kion ni povas vidi? En la centro ni vidas laboron, batalon pri karbo kaj fero. Ostrava vivas sub signo de ruĝa brilo kaj fumantaj kamentuboj. Ni povas admiri novajn, egajn fabrikaĵojn, ni povas trarigardi novajn urbojn Poruba kaj Havířov - rezultojn de nova, pli homa epoko. Ni eniru arbarojn malantaŭ la urbo. Tie ni renkontas postsignojn de heroa liberiga batalo kontraŭ faŝismo en j. 1945. Nur disfalintaj fortikaĵoj restis kiel mutaj atestantoj. Baldaŭ ni ekvidos panoramon de Opava. Trankvila, agrabla urbo, droninta en verdo de parkojn. Ni certe rememoros nian silezian bardon Petr Bezruč, al kiu estas ĉi tie dediĉita muzeo en lia naskiĝdomo. Ni vizitu Silezian muzeon - la malplejnovan en nia lando - sed tre moderne instalitan. Nur post 20 minutoj per snufanta vagonareto ni atingos Hradec ĉe Opava. Blankega kastelo, kiu estas menciita jam en XI-a jarcento kaj kiu iam apartenis al ĉefaj reĝoj. Palaco, kiu aŭskultis ludi genion L.v. Beethoven kaj en kiu komponis Franz Liszt, lokoj, tra kiuj vagadis P. Bezruč.

Sed ni daŭrigu nian promenon kontraŭ fluo de rivero Moravice. Ni iras en

profunda, preskaŭ ne reala valo de la rivero. Ni rememoru Esperantajn tendarojn en Žimrovice, kiuj tiel influis niajn unuajn esperantajn paŝojn. Nun ni preteriras la ruinaĵojn de Vikštejn el la XIII-a jaro, kun romantika monumento de minesengro W. von der Vogelweite. Plua vojo gvidas nin al malgranda banloko "Banloko de paco" kun bona minerala akvo. Poste ni ekvidos akvobaraĵon Kružberk - potenca maro, per kiu moderna homo devigas akvon servi kaj obei. Sep kilometrojn longa estas la lago kun pura, alloga akvo. Trans la lago ni trairas belajn, pitoreskajn sileziajn vilaĝojn kun diligenta kaj laborema popolo. Longe ni marŝos kaj fine ni atingos naturrezervejon Velký Kotel kun riĉa ĉasaĵo kaj rara floraro. Ni grimpu Praděd-montaron kaj ĉirkaŭrigardu tutan nian regionon. Ni povas ankoraŭ daŭrigi tra tuta montaro Jeseníky kaj ni venos ĝis mondfama banloko Jeseníky, ni povas vidi ankaŭ mirindan subteran mondon en proksima Dolní Lípová.

Sed tio jam certe finiĝas nia libertempo kaj ni devas reveni hejmen. Domaĝe, ĉar ankoraŭ multajn interesaĵojn havas nia regiono kiel tuta nia lando. Kaj ĉiujn ni povas vidi! Sufiĉas nur kelkajn liberajn tagojn kaj kun okuloj malfermitaj iri kaj malkovri nian ĉirkaŭaĵon.

Ankaŭ vi ekkonu nian patrujon! Kaj komencu tuj! Pruvu, ke ĉiu esperantisto apartenas al la plej fidelaj amantoj de nia hejmlando!

G. Písecký:

KAREL BURIAN

Ĉi-jare Brno rememoras la sepdekan datrevenon de la debuto de la elstara ĉeĥa operkantisto: Karel Burian en la tiea teatro. - Burian studis kiel prominenta studento ĉe la akademia gimnazio en Praha, poste juron, sed baldaŭ dediĉis sin al la kariero de operkantisto (1891 – 1914). Post la sukcesplena debuto en la tiam vegetanta ĉeĥa teatro en Brno kaj ne povante atingi postenon de solisto ĉe la Nacia Teatro en Praha, li foriĝis en Germanujon, kie li diversloke (Hamburgo, Dresdeno, Berlino k.a.) rikoltis sukcesojn kiel heroo tenoro, precipe en operoj de Wagner. Li estis ankaŭ mallongdaŭre aktiva en Budapeŝto kaj gastrolis en Reval, Londono, Parizo kaj Nov-Jorko.

Ĉe la Nacia Teatro en Praha Burian aktivis nur unu jaron (1900-1), sed la tiamaj rilatoj ĉe la teatro kaj malfavoro ĉe iuj rondoj elpelis lin denove eksterlanden, kie li paŝis de triumfo al triumfo kaj atingis altajn ordenojn por la arto.

Burian distingigis per bela kaj persista Voĉe materialo kun malofta inteligenteco kaj impresegaj artoj aktora kaj kantista. En la jaro 1916 skribis pri li D-ro Zdeněk Nejedlý jenon:

"Burian estis kaj estas antaŭ ĉio ĉeĥa kampara knabo. Li neniam malkonfesos sian devenon, sian lulilon, kiu staris en pure ĉeĥa vilaĝo en ĉeĥa regiono de Rakovník. Li estas knedita el ties grundo, korpe kaj spirite, kaj nenia ardo estas tiom forta por alibruligi lin en fremdlandan mason. Tial li posedas ĉiujn markojn de ĉi ĉeĥa tipo kaj kiel homo, kaj kiel artisto, kie li povas rekte enmeti ĉi markojn en sian arton, tie li entute malhavas rivalon. Pro tio Burian estas tiom elstara reprezentanto de ĉeĥaj knaboj (Lukáš) kaj ĉeĥaj herooj (Dalibor, Kozina), ĉar li mem estas unu el ili kaj pro

sia amo kaj pro sia malcedemo. La plua trajto de Burian estis lia nesatigebla sopiro pri kono, pri konkero de la mondo, pri tio, kio al alia ŝajnas neatingebla. Tial li ellernis tiom multe kaj fariĝis la plej granda ĉeĥa kantisto kaj unu el la plej grandaj kantistoj de la mondo. Lia loko neniam estis tie, kie ne estas la arto. Li devis ĉiam pli altan, ĉar la arto ne estis por li metio, nek profesio, sed paradiza donaco, kiu alportas ne nur delicon, sed ankaŭ suferon de ĉia kono, ĉar ĝi devigas la homon ĉiam plua kaj ĉiam pli alten. Pro tio okazis, ke li enpaŝis ankaŭ en Bayreuth, por ĉi tie, sur sanktigita loko, malvuali sanktan Gralon - li, ĉeĥa knabo el regiono de Rakovník".

Burian ankaŭ eminentiĝis kiel koncertkantisto de popolaj kaj artefaritaj kantaĵoj kaj meritis pri la kolektado de lidoj de Bechyně.

El fremdlando li senĉese skribadis al siaj intimaj amikoj en Ĉeĥlando versformajn rememoraĵojn. La sopiro pri hejmenreveno elspiras el jena lia versaĵo (el 1903):

Al ĉeĥa lando!

Ho, ĉeĥa lando, mi reiros
al via loga sin',
lip' via dolĉa min elspiros
kaj post longjaroj min
en sonĝon milde luldormigos.

Kiel nun for el hejm' arbara
aŭdiĝas tinta vent'
ĝiskisos mi leteron karan,
al mia aŭdosent'
eksonos ĉi ĥoralo klara.

Kiel alaŭdo mi revenas
al via loga sin',
lip' via tiam min retenos
kaj por ĉio ĉe l' fin'
mi fil' dankema al vi benos.

Burian mortis la 25-an de septembro 1924 en sia bieno en Senomaty apud Rakovník je aĝo de 54 jaroj.

La rememoraĵon pri Burian ni finu per kelkaj versoj de l' poemo, kiun pri li verkis la elstara aktoro -

Karel Želenský:

Kiel homoj fremdaj kontraŭ vi insidis
kaj eĉ homoj viaj, aŭdis mi kaj vidis,
ili logis vin en reton de l' malbono
kaj postĵetis vin per kalumnia ŝtono,

ili per perfido vin privesti celis
kaj de vi la gloron kaj honoron ŝtelis.

Kaj vi kantis - flugis pli pli alten ĉiam!
Super malgrandecon, maldankeman, fian,
super vulgarecon de l' envi' eskorta
vi leviĝis ege, ĉam Via – forta!

Kazimierz Malycha - redaktoro
de Ilustrowany Kurier Polski
- Bydgoszcz - Pollando

MIAJ IMPRESOJ EL ĈEĤOSLOVAKIO

Ŝajnis al mi, ke Ĉeĥoslovakion mi jam konas sufiĉe bone. Kelkfoje mi vizitis tiun belan landon, multfoje vagadis tra la ege aminda "Ora Praha", promenis tra mondfama Karlovy Vary, vojaĝadis tra nordaj kaj sudaj, orientaj kaj okcidentaj partoj de nia najbara, frata respubliko.

Sed - verdire - dum mia lasta ekskurso, dank' al la gvidantoj de la Uzina Klubo de Ferfabriko Třinec, dank' al Esperanto-Rondeto ĉe tiu Klubo, mi havis okazon dum mia kvintaga restado tie konstati kun ĝuo, ke en Ĉeĥoslovakio ekzistas regionoj, kiuj malgraŭ tio, ke tra ili ne direktas oficialaj turismaj vojoj, estas same belegaj. Estas domaĝe, ke pro mallonga tempo de nia ekskurso, ni devis ellasi iujn vidindaĵojn el nia programo.

Nia vojo permesis al ni enpenetri en regionojn, kies impresplena beleco, pitoreska situo, pejzaĝa diverseco potencigis sin de kilometro al kilometro. Romantikaj urboj, mezepokaj arkitekture unikaj urboplacoj, malnovaj zorge konservitaj kasteloj ĝojigis niajn okulojn. Mankas paĝoj en "Fajrero" por detale nomi la multnombrajn vidindaĵojn, vidatajn dumvoje. Mi havas okazon pli detale raporti pri miaj impresoj sur la paĝoj de "Ilustrowany Kurier Polski". Unu travivaĵo el multaj neordirare gravuriĝis en mia koro: la belega vespero en Domažlice, en la ĉefurbo de heroa Chodsko, kie ĝis hodiaŭ ne nur ekzistas la ŝtona mezepoko, sed ankaŭ la viva - en formo de halebardistoj, de kantistoj sur la iama defendturo. Kompreneble - mi ne nur admiris la mezepokajn restaĵojn. Skrupule mi notis ankaŭ la grandajn ĉeĥoslovakajn atingojn en novaj, plej novaj tempoj, kiuj estas en via lando ege admirindaj.

Kiel Esperantisto mi interesiĝis dumvoje ankaŭ pri nia movado en Ĉeĥoslovakio. Tre ĝojigis mian koron la multo de E-montrokestoj en urboj kaj urbetoj, tra kiuj ni veturis (en Strakonice eĉ du, eble ankaŭ en aliaj urboj, ne ĉiuj ni vidis). Inventema kaj imitinda estas la dulingva - ĉeĥa kaj Esperanta - alvoko al ŝoforoj kaj aŭtomobilistoj en Příbor proksime de Místek - "VETURU ATENTE"! Niaj dumvojaj renkontiĝoj kun esperantistoj en Strakonice, Plzeň kaj precipe en Tábor, kie gesamideanoj afable akompanis nin dum nia vespera migrado tra tiu unika en Eŭropo urbo. Bedaŭre – la tre riĉa programo kaj rapida vojaĝado ne permesis

kontaktiĝi dumvoje ĉie kun esperantistoj.

Por ne trouzi la neampleksajn paĝojn de "Fajrero", mi devas fini miajn ekskursajn impresojn, esprimante mian elkoran dankon por la afable alsendita invitilo kaj modela organizado de la tuta ekskurso, reforgesebla por mi kaj - mi estas certa - por ĉiuj aliaj geekskursanoj.

Ne estus al mi eble partopreni tiun belegan ekskurson, se ne helpus min niaj vojevodiaj pasportaj instancoj. Kiam mi al la oficejestro montris la invitilon el Třinec kaj antaŭmetis - kiel elokventan dokumenton - la elegante eldonitan albumon de la Ferfabriko, li tuj promesis prizorgi la elveturpermeson kaj vere prizorgis ĝin en rekorda tempo. - "Multaj Esperantistoj venas al mi kun esperantaj invitiloj de eksterlando",- diris al mi mi mia interparolanto. "Do ankaŭ mi decidis lerni Esperanton, eble tiam ankaŭ mi trovos eksterlandan amikon kaj vizitos aliajn landojn". Avide li ensorbis informojn pri nia lingvo kaj interesiĝis pri la nuna stato de nia movado en la mondo.

Al ĉiuj kunekskursanoj, precipe al la organizantoj de ekskurso elkorajn salutojn kaj mia deziro:

Ĝis revido dum simila ekskurso en la jaro 1962!

Kazimierz Małycha

NIA SPEGULO

En la tagoj de la 1-a kaj 2-a de julio 1961 aranĝis E-rondeto ĉe ZK ROH Třinecké železářny aŭtobusan ekskurson al Strážnice, kie okazis la folkloro solenaĵoj. Partoprenis ĝin 50 personojn - plejparte gejunuloj, kiuj ĝuis belan folkloran medion.

- = O = -

En la ciklo de vojaĝprelegoj "Vojaĝado sen elspezoj", aranĝis E-rondeto ĉe ZK ROH Třinecké železářny la 25.6.61 prelegon pri Japanio. Prelegis ano de ĉeĥoslovaka deputitaro Inĝ. Bichler, kiu antaŭ nelonge revenis el Japanio. La prelego estis kompletigita per belaj interesaj filmoj.

- = O = -

INSTRUADO DE ESPERANTO-FUNKCIULOJ EN SOLÁRKA.

En la tagoj 25.-27. de junio 1961 Ĉeĥoslovaka Esperanta Komitato aranĝis en la kabano Solárka sur Ondřejník (en la montaro Bezkydy) instruadon de Esperanto-funkciuloj. Partoprenis funkciuloj, do tiuj rondetoj, kiuj ne estis reprezentitaj en Štířín. Krome partoprenis instruistoj de Somera Esperanto-Tendaro en Lančov 1961, entute preskaŭ 60 gejunuloj.

La dimanĉo kaj lunda antaŭtagmezo estis dediĉitaj al du tre valoraj paroladoj:

Dro. Pušová prelegis pri Kubo kaj la ŝtatoj de Latina Ameriko kaj D. Provazník, redaktoro de ČTK, paroladis pri Afriko, kun celo instigi nin direkti nian korespondadon al tiuj kontinentoj.

La posta tempo estis dediĉita al Esperanto-problemoj, ĝisnuna laboro de ĈEK, Esperanto-tendaroj kaj perspektivoj en la Esperanto-movado. El multaj diskutoj rezultis jeno:

Ni devas ankoraŭ pli intense per Esperanto propagandi nian patrujon, uzante presaĵojn disponigitajn de ĈEK.

Ni devas Esperanton doni plene en la servojn de la mondpaca movado, gajni novajn abonantojn de gazeto "PACO" kaj kontribui al ĝi per artikoloj kaj raportoj.

Ni devas zorgi, ke Esperanto helpu en seriozaj problemoj de nuna tempo (interkompreniĝo kun studentoj el Afriko, ĝemeligado de urboj, tradukservo en konkursoj kun laboristoj en fremdlando k.s.)

Ni devas ligi pli proksiman kontakton kun ĈEK kaj raportoj regule pri niaj agad-resumoj.

Tuta restado, pliriĉigita per improvizita kulturprogramo estis denove paŝo antaŭen.

GVIDLIBRO PRAHA

Fine aperis longe atendata "Gvidlibro pri Praha" en plaĉa kovrilo. Antaŭmendoj ne validas. Ĝi estas ricevebla en ĉiuj vendejoj "KNIHA". Ili rekomendas ĝian rapidan aĉeton. Ĝi estas konvena donaco por viaj korespondantoj. Baldaŭa elĉerpiĝo signifas, ke ni denove povos eldoni similan libron pri Bratislava, Brno k.s.

- o 0 o -

INFORMO

Laŭ sciigo de la Urba kulturdomo en Bratislava, Somera Esperanto-Kolegio en Trenĉianské Teplice pro teknikaj kaŭzoj ne okazis.

- o 0 o -

EL LA MONDO

La gazeto STUDENTO publikigis liston de altaj lernejoj, ĉe kiuj ekzistas katedroj de Esperanto. Entute 30 institutoj en 18 landoj instruas Esperanton.

UNESCO eldonis en Esperanto "Rakontoj de Rabindranatha Tagore" - por alproksimiĝi orientan kaj okcidentan kulturojn.

En Sovetunio, en la urbo Chmelnickij, eldonas la Domo de Pioniroj dusemajnan gazeton por rondetoj. Junia numero estis dediĉita al Esperanto kaj menciis - krom aliaj raportoj kaj adresoj de ĉeĥoslovakaj korespondemuloj - pri nia "Fajrero".

Infanoj el Cieszyn - Pollando (en la aĝo de 7 ĝis 11 jaroj) kantis kaj deklamis en pola kaj Esperanta lingvoj en nederlanda radio-stacio por nederlandaj infanoj. La programon surbendigis s-o Inĝ. Zdzislaw Glajcar, kunlig-vortojn parolis s-anino Zofia Foltyn.

Tiu programo estis komentita en nederlanda lingvo kun favoraj esprimoj pri Pollando.

Interamika kunlaboro de E-rondeto ĉe ZK TŽ kaj redakcio de Ilustrowany Kurier Polski en Bydgoszcz sukcese progresas. En junio vizitis Ĉeĥoslovakion s-ano red. Malycha, por partopreni aŭtobusan ekskurson tra la meza kaj suda Bohemio. Dum lia restado en Třinec li vizitis Ferfabrikon kaj intervjuis sekretarion de ZK – k-do Boh. Goj. Rezulte de tio red. Malycha skribis vastan artikolon pri organiza strukturo de ZK Třinecké železářny (en n-ro 144-. En n-ro 142 de IKP red. Malycha priskribas pasigon de ekskurso, en plua n-ro publikigas vastan artikolon pri Domažlice kun du sukcesaj fotoj. Krome li publikigis ankoraŭ kelkajn artikolojn pri nia lando - (pri Žilina, pri Lipno k.a.). - (Hodiaŭ ni publikigas lian artikolon "Miaj impresoj el Ĉeĥoslovakio".)

"SUB LA SIGNO DE LA VERDA STELO"

estas titolo de filmo, kiu estis farita dum la 44-a Jubilea Universala Esperanto Kongreso en Varsovio en la jaro 1959. Nun ĝi estas projekciata en polaj kino-teatroj kiel superprogramo. La nomitan filmon oni ankaŭ projekciis en televido de Katowice.

En Saloniki en Grekio oni organizis en la tagoj de 14-a ĝis 28-a de aŭgusto Internacian vakacian semajnon, kun riĉa programo. Partoprenas ĝin geesperantistoj el multaj landoj.

ANONCETOJ

22-jara studentino de geologio dez.koresp.,'interŝ. bildoreprodukajojn. Adr.: Nonna Kaduškina, Rostov - Bon. 19, 14 linio , 24 , USSR

Korespondi deziras: Rumen Ganĉev, str.Dimitar Anastasov 7 kaj Nedo Georgiev, str. Kliment. Ohridski ambaŭ el Ruse, Bulgario.

Gimnazia direktoro Lajos Domokos, Budapest Ito,Löránitffy Zs.u.3. gimnazio, profesoro de geografio dez. korespondi kaj ricevi materialon pri geografio kun samprofesiuloj. En la sama gimnazio 15-16 jaraj knabinoj serĉas gejunulojn por korespondi. Vizitu ilin okaze de via vojaĝo al Budapest. Skribu al ili.!

HUMORO

Viro iras en la parko brak' en brako kun junulino. Ŝi demandas: "Kiu estas tiu, kiun vi tiel sindone salutis?- Ĉu via fianĉino?"

"Eĉ ne demandu? Sufiĉos, se poste ŝi demandos min, kiu estas vi.?!"

PERSONAJ RAPORTOJ

S-ano Inĝ. Vlastimil Kočvara estis 30.6.1961 promovita en la maŝina fakultato de Alta lernejo ministra en Ostrava kiel minmaŝina inĝeniero. Nun li daŭre laboros en Opava. Ni varme gratulas al nia administracia estro.

Al familio de Inĝ. Jan Werner naskiĝis filineto Petra. Ni kore gratulas.

Fajrero estas bulteno de junaj esperantistoj en Nord-moravia regiono. Aperas laŭbezone. Aŭgusto 1961, n-ro 3.

Eldonas: ZK ROH Třinecké železářny VŘSR, E-kroužek.

Redaktas: Jan Pomykacz, Inĝ. Jan Werner

Responda: Jar. Novotný, Ostrava I. Tyršová 11

Administras: Inĝ. Vl. Kočvara, Ostrava 8, Kamenec 3/251

Ĉeĥoslovakio - T-03 - 11501